

# La Voĉo de la Kongreso

Eldono okaze de la 25a kongreso de Sennacieca Asocio Tutmonda - Duseldorf 2a - 8a de aŭgusto 1952

## Evoluo de la Konsum-Kooperativo Düsseldorf

La Konsum-Kooperativo nun festas sian 55-jaran ekziston. La fondo okazis la 11-an de aprilo 1897, prefere de laborista grupo sindikata. La ideo venis el la mizero de la tempo. Malgraŭ la ekonomia evoluo en Düsseldorf la salajroj k vivkondiĉoj de la laboristoj estis malbonegaj. Oni volis liberigi sin de la premo de vendistoj k butikistoj, kiuj pro skrupulaj prezpostuloj k la malindiga pruntsistemo alcelis sklavigon de merĉuloj.

La fondo okazis sub la nomo „Wohnungs- und Konsumverein der Arbeiter“ (Loĝej- k Konsumunuigo de Laboristoj). Poste la nomo estis ŝanĝita al „Allgemeiner Konsumverein Düsseldorf und Umgegend“ (Generala Konsumunuigo por Düsseldorf k ĉirkaŭo).

Celo de la entrepreno estis

1e Aĉeto de vivajoj k ekonomiaj po grande k vendado po detale al la mem-  
broj,

2e Havigo de loĝejoj;

3e Utiligado de ŝparmono, precipe por provizi la membrojn je karboj k terpomoj por la vintro.

La komenco estis peniga k malfacila.

La entreprena kotizo estis fiksata je 15.- Mk k pagata je 50 pf, nur malrapide enkasigata.

Malgranda butikoj estis luata por la var-eldono. La malfacilaĵoj ne fortimigis la gekdojn. Eĉ la malsukceso de la unua jaro ne senkuraĝigis ilin, kvankam ĉiu el la 76 membroj per 1,81 Mk devis pagi la mankon.

Dum la unuaj jaroj la juna kooperativo nur malmulte progresis. Post kvarjara ekzisto oni havis spezojn de 19.398,- Mk. Tiam ankaŭ en la najbaraj urboj maturiĝis la kooperativaj ideoj k la interŝanĝo de spertoj kaŭzis pli grandajn sukcesojn.

La bilanco de 1906-1907:

10 vendejoj,  
3435 membroj,  
42 oficistoj,  
1.007.403 Mk spezoj,  
53 8 7/16 k kompenso.

La daŭra evoluo necesigis novan centron. En 1906 oni akiris la terenon Ronsdorfer str. 6, en 1909 nova centromagazeno kun apudaj konstruaĵoj k bakejo kun tri duoblaĵ eltirfornoj estis ekfunkciigataj. Ĝis 1912-1913 10 loĝdomoj estis konstruitaj.

Centra magazeno k bakejo estis ege pli grandigitaj dum la sekvintaj militjaroj - kaforostejo, malfarejo, enboteligejo, teknika laborejo, karbo- k terpomprovizejo konstruitaj.

En junio 1917 la bieno „Söbberinghoff“ estis aĉetata. Ĝi ebligis en la postmilitaj jaroj revalorigi la ŝparhavaĵojn de la membraro je 50%. En k post la inflaciaj jaroj ĝis 1930-1931 la movado daŭre pligrandiĝis.

En 1933 ekzistis 103 ĝeneraliaj k 26 spe-

cialaj viandvendejoj. Pleje sukcesa estis la jaro 1930-1931 kun 16.800.000 Mk.

La principoj de la fondintoj ĉiam restis fundamentaj. Nur bonaj, kvalitataj varoj estis vendataj je malaltaj prezoj k ĝusta pezo. La gajno laŭ alto de aĉetaĵoj estis re-kompensita al la membroj, parte 7% de la spezo.

La jaroj 1933-1945 estis malagraba ĉapitro en la historio de la kooperativo. La malnovaj provitaj estrarmembroj k kunlaborantoj estis eksigitaj. Unue la nomo estis ŝanĝita en „Verbrauchergenossenschaft - Konsumo Kooperativo“, 1941 la entrepreno transiris en „Komuna entrepreno - proviziga rondo“. Per tio estis kreata tute kapitalista entrepreno, kiu ĉiam pli k pli malsukcesis k sekvigis eminentajn malprofitojn k difektojn post la milito.

Tuj post la liberigo de Düsseldorf per la Amerikanoj multaj malnovaj kooperativanoj lamiĝis kiuj laŭ antaŭaj elprenitaj principoj restarigis kooperativan revivigon.

Ĉe transpreno de administracio de 110 vendejoj 37 estis tute detruitaj per la militaj okazintaĵoj, ĉe multaj aliaj devis esti riparataj diversspecaj difektoj.

La militregistaro permesis la novestablon de la konsum-kooperativoj k redonon de proprajoj.

La 27an de aprilo 1946 estis fondita la

„Konsum-Genossenschaft e.G.m.b.H.-Konsum-Kooperativo por Düsseldorf, registrita kompanio kun limigita kaŭcio“ k la statutoj novfaritaj laŭ demokratiaj principoj. Ekde tiu tempo estas agata kun kuraĝo, forto, persistemo k energio laŭ kooperativaj ideoj. Spezoj k membraro plialtiĝis de jaro al jaro.

La spezoj estis

1945 RM	5.252.360,—
1946 RM	6.292.904,—
1947 RM	6.589.643,—
1948 DM	10.104.111,—
1949 DM	15.957.763,—
1950 DM	18.319.689,—
1951 DM	25.736.583,—

La 31an de decembro 1951 la membraro nombris 35319 anojn.

La vendeja reto pligrandiĝis je 88 k la personaro plialtiĝis ĝis fino de 1951 je 311 personoj.

Preskaŭ ĉiuj vendejoj estas renovigitaj k aspektas invitaj k puraj.

La Konsum-Kooperativo estas la memhelpa organizo de la konsumantoj. Per la kunigo de la konsumantaro ĝi fortigas la ekonomian influon k rezultigas pli bonajn vivkondiĉojn per oportuna disdono de la varoj sen negoca profito — en aĉeto po grande la varoj estas prizorgataj je fervoraj kondiĉoj direkte ĉe la produktanto.

Multaj varoj estas memfabrikataj en 32 grandaj fabrikoj de GEG (Grosseinkaufs-Genossenschaft — Kooperativo por aĉeti po grande) en kooperativa administrado; la disdono al la konsumantoj estas en malgrandaj kvantoj je malaltaj prezoj.

La jara profito malgraŭ la malaltaj prezoj estas repagenda al la membroj — en 1951 5% = 1,2 Milionoj DM.

Tio signifas plian prezoredukton k plenumas la sindikatan postulon je asimilo de la prezoj al la salajroj.

La repago ne estas komparebla al rabato; ĝi estas gajno el la vendo.

Por fariĝi membro necesas skriba deklaro; la aliĝkosto estas 1,— GM. La kapitalo de la Konsum — Kooperativo estas prefere la akcioj de la membroj. Ĉiu membro estas kunposedanto de la tuta havaĵo k rajtas kundefidi laŭ demokratiaj principoj.

La organoj de la Konsum — Kooperativo estas: delegitaro, kontrola konsilantaro k estraro.

La rajtoj de la membroj estas observataj per la delegitoj elektitaj por ĉiu vendejo por la daŭro de 3 jaroj. La elektitaj delegitoj prizorgas ĉiujn aferojn de la vara prizorgo k la administradon de la komuna posedo por la membroj.

La membroj aĉetas en sia propra aĉetejo k decidas pri sia propra ekonomia entrepreno. Pli bona vivo estas ebligata per la ekonomia helporganizo en la granda

Konsum-Kooperativo.

### MONDOPACO



O. E. Hartleben

*Nova tag', per via helo  
Mortu nun maljuna Nokt';  
Liberigu el kruelo  
Sin post dormomanka lukt'!  
Mondo, mondo nun post pactrankvilo  
Kvieto post batalodor',  
Al popoloj paco brilu,  
Pac' al ĉiu homa kor'!*

*Ne per sango plu kaj fero  
Solidiĝu hom' alianc',  
Amo montru al ni veron  
Pri komuna voj' kaj ŝanc'!  
Gentmalamo jam kaduku,  
Rustu militista ŝtal'!  
Nin al Paco voj' konduku,  
Regu Pac' en monda skal'!*

*Mondopaco, Mondopaco,  
Laste elpetata venk'!  
Sonu, sonu kant' sen laco,  
Ĝis ni ĝuos vian kvieton,  
Kantu ni al stelkupol':  
Ĉiuj serĉas packompleton,  
Paccon ĉiu hompopol'!  
Paccon, Paccon!*

Tradukis N. B.



# ESPERANTO

## KAJ LERNEJO

★

Kontribuo por la paco

### MULTFLANKA UTILO DE ESPERANTO

Gepatra lingvo kunligas vin je la hejmo, Esperanto kunligas vin kun la tuta mondo!

(Referato de nia k-do eksinstruisto Josef Hajek, Ernsthofen en Odenwald, dum la Internacia pedagogia Esperanto-Seminario en la bavara urbo Kochel.)

*Liberigu vin je antaŭjuĝoj,  
por ke vi estu libera homo!*

La mondhelpingvo Esperanto laboras k batalas por la bonfarto de ĉiu homo sen diferenco pri raso, religio k politika partio. Esperanto speciale fortigas la internacian konfidon, kiu estas en la nuna necerta danĝera tempo la plej grava fundamento por paca kunvivado de la popoloj en la tuta mondo.

Precipe mi klare pruvos, ke la popolklerigilo Esperanto stimulas, incitas k instigas la junularon por la internacia kompreno, internacia interkompreniĝo, por demokratio k por la interpopola amikeco.

### NECESO DE ESPERANTO

Esperanto, la dua lingvo por ĉiuj homoj!

Ĉu ni absolute bezonas fervojojn, aviadilojn, radio-aparatojn k krom nia gepatra lingvo ankoraŭ la internacian komprenilon Esperanto? Ni povas jesi tiujn k similajn demandojn k ankaŭ eĉ nei. Dependas de tio, en kiu tempo oni volas vivi. Ekzemple la homoj de la glacia tempo ne havis tiajn progresilojn k kompreneble ankaŭ ne internacian interkomunikilon. Malgraŭ tio tiuj prahomoj vivis kontente k feliĉe. Eble estus por ni pli bone, se ni povus vivi en tiu pratempo ĉe niaj pra-prageavoj. Tiam ni ne bezonas timi la terurajn, la mondminaĉantojn atombombojn. Sed ni vivas en nova, moderna epoko k devas alkonfirmiĝi, adaptiĝi. Tial ni uzas menciitajn interkomunikilojn, same ankaŭ la kulturprogreson Esperanto, ĉar tiuj iloj plibonigas, plifaciligas k plibeligas nian vivmanieron.

Ĉu ni volas daŭre persisti en la nuna konstante kreskanta mondtrafiko je nia lingva ĥaoso, je nia babilona lingvokonfuziĝo? Ĉu la popoloj ĉiam ankoraŭ devas vivi kune kvazaŭ kiel surdmutuloj? La solvo de tiu lingva konfuzo estas facile trovebla por ĉiu praktike pensanto k por ĉiu progresemulo.

Ĉiuj radio-aŭskultantoj aŭdas tage, hore la plej diversajn lingvojn, kiujn tre multaj ne komprenas. Malmultvorte — la babilona lingvo-konfuziĝo al ni klare estas kondukata je niaj oreloj. Pro tio la radio-progresilo bedaŭrinde iĝas en la mondradia trafiko nur duona progreso. Ankaŭ tie Esperanto, tiu belsona lingvo, estas la plej taŭga disvastigilo en internacia radio-trafiko.

Internacia kompreno k interpopola kompreniĝo estas en tiu-ĉi tempo de granda malkonfido necesega. Esperanto, tiu neŭtrala lingvo, estas ankaŭ taŭga nivelo, je kiu ĉiuj diverslingvanoj sin povas renkonti. Tiu lingvo faciligas la necesan ekkonon, ke ĉiuj homoj estas membroj de granda familio. Ankaŭ la praktika aplikado de Esperanto produktas la noblan konscion, ke ni ĉiuj povas esti unu la alian amikoj — se ni nur volas.

Ni hodiaŭ evidente staras, sekve de malĝojaj spertoj dum la lastaj du militoj, je la komenco de vere homara konscio. La teruraj okazintaĵoj en la pasintaj mond-militoj kapabligis k maturigis la homojn por novaj konceptoj de ilia vivado en speciala, kultura k politika rilatoj k speciale pri la paco. Ĉiuj progresemaj homoj de nia moderna tempo ankaŭ pripensas ĉiujn perilojn por pli bona vivado ekz. la mondregistaron k la mondhelpingvon.

Estas ankoraŭ menciinde, ke pli ol 15 milionoj da personoj petis la UN (Unui-

ĝintaj Nacioj) por enkonduko de Esperanto mondscale. Tiun petskribon ankaŭ subskribis la prezidanto de la Franca Respubliko k la ĉefministroj de Aŭstrio, Ĉekoslovakio, Nederlando k Polio.

Resume: La homo de la glacia epoko vegetis en sia kaverno ĉe rezin-ligna lumo, sen radio, sen gazeto, sen telefono k en la trafiko sen Esperanto feliĉe k kontente; sed ni homoj en la hodiaŭa moderna tempo vivas en niaj domoj kun elektra lumigado, kun radio k literaturo, same en la trafiko kun la diverslingvanoj per Esperanto pli komforte, pli agrable, pli kontente k pli feliĉe.

### ESPERANTO, FACILE LERNEBLA LINGVO

Esperanto unuigas en si la fortecon de la angla lingvo, la profundecon de la germana, la elegantecon de la franca k la belsonecon de la itala lingvo.

Antaŭ 70 jaroj Friedrich Nietzsche profetis la jenon: En iu estonto ekzistos nova lingvo, uzata unue kiel komercilingvo k poste ankaŭ por la spirita trafiko de la popoloj.

Kelkajn jarojn post tiu eldiro la rusa okulkuracisto d-ro Zamenhof efektivigis tiun profetaĵon per kreo de la Esperantolingvo.

Zamenhof ricevis la ideon pri kreo de la mondhelpingvo jene: En lia hejmurbo Bialistok loĝis kvar nacioj nome: Rusoj, Poloj, Germanoj k Judoj. Tiuj vivis kune en reciproka malamikeco, ĉar ili ne komprenis unu la alian sekve de diverseco de la lingvoj. Do la diverslingveco estis la kaŭzo de tiu malamikeco. La kuracisto Zamenhof rimarkis tion kiel infano k pro tio li jam depost sia infaneco cerbumis, kiamaniere oni povus forigi per interpopola komprenilo malamon k malamikecon inter la nacioj.

La multlingvoscia d-ro Zamenhof komparis la plej gravajn eŭropajn lingvojn k ekstraktis el ili la plej komunajn vortojn k interligis ilin en lerta maniero je nova lingvo. Zamenhof eldonis tiun lingvon, konstruita laŭ certa plano, sub la pseŭdonimo „Esperanto“.

Zamenhof kompilis lingvon simile kiel Luther. Dum Luther kreis la altgermanan lingvon el la germanaj dialektoj, Zamenhof kompilis Esperanton el la eŭropaj lingvoj. Esperanto estas laŭ enhavo alteŭropa lingvo, ĉar ĝi estas eltiro, ekstrakto el la eŭropaj lingvoj.

La planlingvo Esperanto enhavas ĉirkaŭ sesdek procentojn da romanaj, tridek da germanaj k dek procentojn da slavaj vortradikoj, nekalkulite la internaciajn.

La verko de Zamenhof plenumas ĉiujn postulojn k fundamentajn kondiĉojn de taŭga mondhelpingo nome: neŭtraleco, laŭsona prononco, laŭlingva skribmaniero, unusignifikeco, precizeco, liberigo de esceptoj k malreguloj, logiko, adapteco k aplikebleco por ĉiuj celoj.

La spertoj montras, ke infanoj Esperanton facile perceptas, lerte majstras k uzas ĝin kun entuziasmo. El tio rezultas, ke tiu lingvo perfekte respondas al la komprenkapablo de la junularo, plue ke Esperanto la infanojn spirite ne lacigas. Nia junularo, kiu volas tre volonte fari travivaĵojn k novajn eltrovojn, spertos en la Esperanto-instruado multajn Kolumbus-ĝojojn. La infanoj baldaŭ rimarkos kun kontentiĝo, ke en Esperanto ankaŭ estas parto de sia gepatra lingvo. Tio kompreneble efikigas pli rapidan lernon de la E-lingvo; ĝi estas belsona k melodias — tial infanoj kun ĝojo kantas E-kantojn.

Esperanto jam kiel instrua fako en la lernejo alportas al la junularo k samtempe ankaŭ por la instruistoj grandan utilon. Ekzemple ĝi pligrandigas la lernĝojn de la infanoj je aliaj fakoj k enigas multe da ĝojoj en la ofte seriozajn lecionojn. Precipe la geografia instruado estas vigligata. Kun fervoro la infanoj serĉas la loglokon de la skribinto kiu sendis la ilustritajn kartojn, leterojn, poŝtmarkojn, plantojn, desegnaĵojn ktp. Per tio la geografia studo fariĝas pli interesa k pli fruktodona.

La manifesto de la geinstruista konferenco en Genevo 1922 certigas, ke Esperanto vekas la intereson por geografio, mond-historio, arto k literaturo. Krom tio tiu manifesto ankoraŭ komunikas la fakton, ke la infanoj akiris jam post unu lernjaro pli praktikan scion de Esperanto ol de aliaj lingvoj.

Per la unueca mondlingvo Esperanto ĉio okazas pli bone, pli rapide, pli simple k pli bele. Kaj kial? Tial, ĉar ĉiu povas kanti k preĝi kun la aliaj, plie li povas legi ĉiun libron; same per Esperanto li povas kompreni ĉiun paroladon, filmon k radiodisaŭdigon. Ĉiu internacia kunveno, kongreso, renkontiĝo fariĝas por li multenhava, pli sukcesplena, pli signifa k pli ĝuplena. Estas akcentinde, ke la internacia kongreso „Paco por lernejo“, Praha 1922, aplikis Esperanton kiel diskutlingvon. Radio ankaŭ disaŭdigas paroladojn en k pri Esperanto.

Esperanto subtenas komercon k trafikon, forigas la danĝeran naciistan egoismon k ŝovinismon, lingvan superecon k imperialismon, faras restadon k vojaĝojn en eksterlando ankoraŭ pli interesaj, peras interŝanĝobjektojn, propagandas per prospektoj k skribaĵoj por via urbo, via lando, same per mondradio por viaj ideoj.

### Progreso el la lasta tempo:

E-servo en Ĉekoslovakio publikigis la organizon de tiu ŝtato k la lernejan reformon;

Bulgara E-kooperativo, Sofia, eldonis la konstitucion de Bulgario;

E-prospektoj aperis pri multaj urboj en Aŭstrio, Belgio, Ĉekoslovakio, Danio, Germanio, Hungario, Italio, Nederlando ktp.;

La direkcio de la germana federacia fervojo eldonis kolorpresitan reklamfolion;

La sekretario de UN en Lake Succes (Usono) disvastigis la tekston de la Universala Deklaro pri hom-rajtoj en Esperanto;

La Ĉekoslovaka poŝto eldonis bildkartojn kun E-teksto;

Almanako de UL (Universala Ligo) entenas la E-tekston de mondhistorie gravaj dokumentoj;

La flugveturaj entreprenoj SAS, Sabena, KLM eldonas E-prospektojn;

Oficiala subteno al E en Ĉinio, eldono de gazetoj en E kun propagando de la registara politiko;

Registara subteno en Brazilio, i.a. oficiala eldono en E de jubilea libro pri brazila statistiko;

Uzado de E ĉe la socialista partio de Britio k ĉe la Socialista Labor-Partio de Usono;

La Londona Kooperativa Societo uzas Esperanton. Tiu plej granda kooperativo de la mondo, la „London Cooperative Society Limited“, havas pli ol 1.000.000 membrojn. Ĝi ankaŭ eldonas du belegajn kolore presitajn aŭfiŝojn grandformatajn, haveblaj ĉe Londona Kooperativa Societo, 54 Maryland Str., London E 15.

### Literaturo:

Kiel ĉiu lingvo, ankaŭ E posedas propran literaturon. Sed la E-ista havas alian celon

ol la nacilingvaj. La tasko de la E-literaturo estas, disvastigi ĉiujn spiritajn produktaĵojn, kiuj havas internacian valoron aŭ intereson por la tuta homaro. Multaj klasikaj verkoj el diversaj lingvoj estis esperantigitaj — el la angla, franca k germana lingvoj.

Oni eldonis en diversaj landoj antologiojn, t.e. kolektaĵoj de tradukitaj fragmentoj el la literaturo de la lando. Aperis belga, bulgara, ĉekoslovaka, estona, hungara, kataluna, pola, sveda k svisa antologioj.

Esperanto havas sian propran poezion, sian gazetaron k siajn revuojn, kiujn praktike uzas miloj da homoj en ĉiuj landoj. La internacia lingvo faciligas la scian laboron per pli ol cent teknikaj k fakaj terminaroj i.a. pri anatomio, arkitekturo, aviado, botaniko, ĥemio, elektriiko, juro, matematiko, medicino, muziko, navigacio, farmacio, filozofio, fiziko, psikologio, radio, religio, zoologio ktp.

El la novaj aperaĵoj ni nomu nur:

Ivo Lapenna: Aktualaj problemoj de la nuntempa internacia vivo;

Maurits Dekker: La mondo ne havas atendejon;

Louis Bastien: Naŭlingva etimologia leksikono;

James D. Sayers: Invito al ĉielo, romano;

A. P. Andersen: Pri bredado de abeloj.

Vizitu la E-bibliotekon de la Brita Esperantista Asocio, la bibliotekon de la UEA en Genevo aŭ la E-Muzeon en Vieno.

Kiu rigardis la multajn verkojn de la E-literaturo, tiu miregis pri la multflanka apliko, pri la disvastiĝo k pri la esprimkapablo de E.

Esperanto estas aplikata ankaŭ por sciencaj sciigoj, raportoĵoj k prelegoj. Pro tio oni instalas la t.n. „Internaciaj Somer-Universitatoj“.

Pripensu ankoraŭ, ke nacia lingvo vin interligas nur kun la lando, en kiu tiu lingvo estas parolata; sed E kunigas vin kun tiuj popoloj de la mondo!

Konklude: Esperanto alportas multflankan utilon por la junularo k por la plenaĝuloj.

## EDUKA VALORO DE ESPERANTO

Esperanto nobligas la korojn!

Esperanto estas ankaŭ valora popolklerigilo k edukilo. Tial ĝi estas spirita ponto en duobla senco.

Jenaj faktoj klare pruvas tion:

Gelernantoj post pli — malpli mallonga tempo — tio estas ebla nur per E — korespondas kun ĉiulandaj infanoj. Per tio estiĝas amikeco. La junularo kreskas, la amikeco restas k daŭras. Intersaĝo de infanoj, internaciaj junulejoj, eksterlandaj vojaĝoj pliiĝas la menciitajn amikecojn. Tiaj interpopolaj amikecoj k fratigoj estas absolute necesaj k antaŭ ĉio nia unua devo.

Anglo foje diris: Esperanto paves the way to the international friendship, t.e. E ebenigas la vojon por internacia amikeco.

Esperanto nobligas: tion diris la pedagogoj el diversaj landoj, ĉar tiu lingvo plibonigas la homojn speciale kaŭze de sia moralala enhavo k kultura influo.

Per utiligo de mondkorespondado, de la ampleksa literaturo, de la internaciaj junulejoj, ferikolonioj k de la renkontigoj, pere de eksterlandaj vojaĝoj k vizitoj niaj ĝejunuloj ricevas el rektaj fontoj pli precizajn informojn pri la moroj, institucioj, pensadoj, sentadoj ktp. de fremdaj nacioj. Tiamaniere la junularo akceptas mondovitanecan pensadon. Nur la mondovitanoj estas la estontaj helpantoj por la starigo de mondregistaro k fiksigo de daŭra libereco k paco.

Esperanto favoras k produktas mondovitanecajn virtutojn, t.e. reciproka kompreno, ĉiufanka helpo, kompleksemo, objektiveco, frateco, mondamikeco, toleremo, demokratio, humaneco, solidareco, internacia

kompreniĝo. Tiuj ecoj influas k edukas la homojn je porpacaj pensoj, sentoj k agoj.

La jam menciita Geneva konferenco, kiu okazis en la ejoj de la iama „Ligo de Popoloj“, ankaŭ certigas la grandan moralan signifon de E. por la homaro, ĉar tiu ĝefrata lingvo mildigas naciajn, politikajn k profesiajn diferencojn, kontrastojn k kontraŭojn.

Esperanto enhavas ankaŭ sentecon, vivecon k animecon. Kiu pli detale tion volas kompreni k percepti, tiu vizitu nur unu el la E-kongresoj. Tie okazas ĉiujn paroladoj, debatoj, prelegoj, diskutoj, amuzajoj ktp. nur en E. (daŭrigota).

## Saĝa gentestro

Amerika komercisto iutage trovis en magazeno plektitan korbon kiu plaĉis al li ne nur pro la bela formo, sed multe pli ankoraŭ pro la riĉeco k maloŭto de la ornamantoj. Li aĉetis ĝin por la ridinda prezo de kvin dolaroj k kunprenis ĝin hejmen. Kaj ĉar la korbo plaĉis ankaŭ al la edzino k al ĉiuj liaj vizitantoj, la komercisto esploris ĝian devenon; li konstatis, ke ĝi estis fabrikata ĉe malgranda gento indiĝena en la mezokcidentaj ŝtatoj.

Kiam kelkajn semajnojn pli poste negoca afero postulis vojaĝon al okcidento de nia komercisto, li devojiĝis k vizitis la genton de kiu laŭdire venis la korbo. La gentestro afable akceptis k gastigis lin laŭ la sanktaj reguloj de indiĝena gentileco k prezentis al li donace — korbon, simila al enhejma.

Nun li sciis, ke li troviĝas ĉe la gento fabrikanta tiajn korbojn, kiajn li serĉis. Ankaŭ li prezentis siajn donacojn k dum la sekvinta parolado li laŭdis la lertajn manojn de la laboristinoj kiuj kapablas fabrikii tiajn belformajn k ornamiĉajn korbojn. Fine li proponis al la gentestro vendi 1000 tiajn korbojn k diri la prezon.

Post mallonga pripensado la gentestro postulis entute 2000 dolarojn.

Nia komercisto kalkulis sufiĉe grandan monprofiton kiun li esperis pligrandigi per pli granda mendo. Post kelka tempo li demandis pri la prezo de 5000 korboj.

La gentestro postulis 15000 dolarojn por la 5000 korboj — 50% pli altan prezon po peco ol antaŭe.

Iom mirigita, la urba sinjoro atentigis la maljunan gentestron pri la nekonvena sinteno en kalkulado.

Tiu respondis tute trankvile sed konvinke:

„Retenu vi vian monon, amiko! Ni malŝatas tiun inferan eltrovaĵon, ĉar ĝi forrabas de ni ĝojon, familian vivon k pacon. Se niaj inoj devas labori por kontentigi viajn dezirojn, ili ne plu povas varti la infanojn, ne plu povas kanti dum la krepuskaj horoj vesperaj k danci, ne plu trovas la necesan tempon por plenumi siajn mastrumajn taskojn.“

„Kaj ni viroj fariĝis malkontentaj.“

„Pro kio tiam ni vivu?“

„Gardu vi vian monon k lasu al ni nian trankvilon k pacon!“ v. Beesten.

## Inter ni - pri nia lingvo

Petite de la OKK verki ion por la „Voĉo“, mi tuj ekhavis la ideon, skribi ion pri la lingva uzado inter SAT-anoj. Neniu pensu, ke mi estas kvazaŭ lingva sportulo! Ne, por mi nia lingvo estas nura rimedo por la interkompreniĝado. Kaj ĝuste tial mi celas, ke ĝi estu uzata precize k klare, por ke la interkompreniĝo estu tiom facila, ke estas ĝuo aŭskulti nian lingvon parolata. Mi bone ankoraŭ rememoras pri tiuj gekamaradoj, kies modelan lingvon mi aŭdis en la komencaj jaroj de SAT, kiam mi estis novbakita Esperantisto. Ĉe flamaj „antaŭkongresoj“ en Dresden (1921) k SAT-kongreso en Frankfurt (1922) mi entuziasmiĝis pri Esperanto ĉefe per la reliefaĵaj paroladoj de

kelkaj bonparolintoj, kies simpla stilo k akurata prononco ebligis al mi bonegan komprenon de iliaj pensoj k ideoj. Mi opinias, ke niaj kongresaj tagoj devus esti samsignifaj kiel iu universitata lingvoekzameno! Nacia lingvo, flegmemo de kursgvidanto k lernanto kaŭzas pleje la prononcajn malakurataĵojn. Malgraŭ la Zamenhafa alfabeto estas sama sur la tuta terĝlobo, mi konstatis, ke iuj nepre devas kontroli sian tiurilatan prononcon! La frazkonstruo en naciaj lingvoj — precipe en la germana — ne estas ĉiam logika. Tial necesas, ke oni deĉutimiĝu de tradukparolo, do, oni ne pensu nacilingve parolante Esperante! Al ne malmultaj gekamaradoj mi rekomendas ekzerci la ofte uzatan vorton „scii“, por ke malaperu la misformoj „ĉii“ k „sii“ anstataŭ „s-cii“! Tre rekomendinde ankaŭ estas, ke oni neniam disigu la helpverbon de verbo, ekz.: „mi ne volas la paroladon aŭskulti“ anstataŭ: „mi ne volas aŭskulti la paroladon“. Ju pli simpla, klara k logika, des pli praktika estas nia lingvo por plenumi sian taskon: esti el ĉiuj lingvoj la plej racia interkomprenigilo. Sed tia ĝi nur fakte estas, se la uzantoj direktas sin laŭ la gramatikaj reguloj k logiko. Instigi al tia klopodo, estas la celo de ĉi tiu artikolo.

Ĝis revido k reaŭdo en Düsseldorf!

A. v. d. Heid (61).

## Pri la Esperanto-movado en Düsseldorf

Pasintjare, la 11an de aprilo, la Esperanto-Societo, Düsseldorf, festis la 40an datrevenon de la fondiĝo. Kvankam tia periodo ne estas multe da tempo en la homara ekzisto, tamen estas multe en la historio de nia movado — en ĝi respeguliĝas multe da laboro, multe da esperoj k suferoj k ankaŭ seniluziigoj.

El la fondinta-rondo nur unu, k-do Ludwig Thies, povis partopreni la solenon; la aliaj mortis aŭ transloĝiĝis intertempe.

La unuajn jarojn — ĝis ekiĝo de la mondmilito 1914-1918 — la movado progresis nur malrapide k suferis la unuan mortigan baton per la milito kiu ekflamis la naciecajn, malamikajn pasiojn inter la popoloj k detruis preskaŭ ĉiujn homarajn pensojn. La inflacia tempo apenaŭ ebligis akiri la vivrimedojn — kotizoj por unuigoj jam estis lukso; Thies k liaj fideluloj restis kune, perfektigis en la lingva uzado k preparis la varbadon por estonta, pli bona tempo. Fine — en la jaroj 1924-1925 — stabiligis la cirkonstancoj k ili sukcesis varbi novajn lernantojn, novajn anojn por nia lingvo, nia ideo. Nova, ega bato, kiam fendiĝis la laborista grupo — la vivnervo estis trafata k ĝis malpermeso de Esperanto per la naciistoj en 1935 nia movado ne plu povis resaniĝi.

Kaŝe dum la „miljara regno“ kunvenis la idealistoj, zorgis ke ne disiĝis la rubandoj amikecaj, lingvaj. Kaj kiam en 1946 la ĉenoj de mallibereco estis rompataj, kunvenis unuafoje je 30 homoj, kiuj iom post iom altiris malnovajn E-istojn, perdintaj la kontakton pro la milito aŭ venintaj intertempe al Düsseldorf. Nia k-do Bartelmes, tiatempe membro de la grupo, restarigis la kontakton kun SAT k gvidis la unuan kurson por malnovaj E-istoj. Nova grupa laboro ekfloris, kursoj por komentantoj starigis, la grupo kreskis k superis centon, sed — bedaŭrinde — venis nur malmultaj junuloj. Pro tio la Düsseldorf-a grupo havas pli multe da maljunuloj. Sed la interkonsento estas bona, la fervoro nelaciĝanta. Tio kaŭzis ke la Düsseldorf-aj Esperantistoj ne kontraŭis, kiam la urbo invitis la ĉi-jaran kongreson — ni eĉ konfirmis la administraciajn instancojn, konfidante ne nur al niaj kapabloj sed multe pli ankoraŭ al la ideo de nia movado k ĝiaj agoj.

H. Pillekamp.

# PROVIZORA ROGRAMO

- 2.8.52 9.00 h Malfermo de la akceptejo  
(Rejnhalo)  
20.00 h Interkonatiĝvespero, fino?
- 3.8. 10.00 h Solena malfermo  
a. Himno: Mondpaco  
(esperantlingve)  
Popolĥoro Düsseldorf-  
oriento  
b. Salutparoladoj  
c. Komuna kanto: Fratoj al  
sun.
- 12.30 h Komuna fotografado  
15.00 h Ekskurso
- 4.8. 9.00 h Unua laborkunsido  
12.30 h Komuna tagmanĝo  
14.30 h Prelego: k-do Laurat  
18.00 h Frakcikunsidoj
- 5.8. 9.00 h Dua laborkunsido  
12.00 h Komuna tagmanĝo  
13.30 h Vizitoj al kooperativaj  
entreprenoj:  
Sapfabriko 100 personoj,  
Konsumkooperativo 100 per-  
sonoj,  
Viandajfabriko 35 personoj.  
Por la ceteraj ekskurso  
La vespero estas libera al la  
gek-doĵ.
- 6.8. 9.00 h Prelego: K-do Bartelmes  
12.00 h Komuna tagmanĝo  
14.00 h Frakcikunsidoj laŭ bezono  
19.00 h Multkolora vespero
- 7.8. Tuttaga ekskurso
- 8.8. 10.00 h Fermkunsido.

## Ni dankas

La desegnojn por la glumarkoj faris nia k-do Antwerpen, oficisto en la presejo Hehner, kiu siavice donacis krom tiuj-ĉi kliŝoj ankoraŭ tri aliajn por poŝtkartoj. La poŝtkartojn presis je memkostoj la firmao Fratoj Hermes.

## Gravaj sciigoj

Denove OKK atentigas vin, nepre serioze indiki viajn dezirojn sur la aliĝiloj. Nur tiam ni havos la eblon ĉion aranĝi laŭ viaj deziroj. Rilatas

1e al la ĉambroj (je kioma prezo, pri kiu ni memkompreneble ne povas garanti),

2e pri partopreno al ekskursoj por ke ni povu mendi sufiĉe grandan ŝipon: rajtas partopreni la tuttagan ekskurson nur, kiu anoncis sin antaŭ la komenco de la kongreso.

Kiu forĝesis anoni sin pere de la mendilo, bonvole informu nin eble plej baldaŭ.

Tendaro pro manko de tendoj ne povas okazi; anstataŭ tio ni aranĝos amasloĝejon en lernejo. Ni esperas, ke tiu solvo kontentigos niajn gek-doĵn. Nun jam OKK atentigas vin, ke necesas kunalporti kovrilojn.

Senpaga vizo: ĝis nun OKK ne sukcesis ricevi ĝin por niaj eksterlandaj gek-doĵ, sed ĝi daŭrigas siajn klopodojn k tuj informos ĉu per gazeto, ĉu per la landaj perantoj. Ĉar la fervojistoj E-istaj sukcesis ricevi ĝin okaze de sia kongreso en Lindau (majo), ni esperas sukcesi same.

La listojn de kongresantoj, ĝis nun aperintaj en „Sennaciulo” ni daŭrigas en tiu-ĉi n-ro de la „Voĉo”.

Adresoj de OKK-anoj:


Hans Pillekamp  
Hamburgerstr. 5-21, Düsseldorf  
Wilhelm Ackermann  
Hammerstr. 58, Düsseldorf  
Werner v. Beesten  
Kolpingstr. 4  
Düsseldorf-Benrath

# 25 KONGRESO 25

2.-8. AUGUSTO

ESPERANTO

SAT ★ 1952 ★



## Listo de aligintoj, daŭrigo de la listo en Sennaciulo n-ro 6

264. Damsehen Fr., Osnabrück; 265. Suckfüll M., Frankfurt; 266. Röder W., Haspe; 267. Böcker H., Gelsenkirchen; 268. Spruch Ch., Krefeld; 269. Jacobs W., Nordhorn; 270. Schumacher Fritz, Karlsruhe; 271/72. Hiebeler E. k Fr., Heidelberg; 273. Herbst Fr., Helmstedt; 274. Löwe A., Duisburg; 275. Jäger D., Frankfurt; 276. Escherich H., Leverkusen; 277. Schiffer Q., Recklinghausen; 278/79. Schmidt H. k Th., Ludwigshafen; 280. Teteberg, W. Buer; 281. Wagner A., Bremen; 282. Diekershoff E., Schwelm; 283/84/85 k 286. Guillou S. M. J. k A., Tréméven; 287. Lhenaff R., Paris; 288/89/90. Clerc L. S. k D., Chevry; 291. Montagne P., Evreux; 292. Bazire D., Preventorium; 293. Bournazel R., Lagny; 294/95. Grandiere R. k L., Pantin; 296. Cossard I., Bobigny; 297. Reynéau L., Angers; 298/99. Benazet R. k Cl., Osseja; 300. Laurat L., Paris; 301. Claude M., Paris; 302. Martin F., Bourg-Les-V. 303. Bellette N., Boncourt; 304. Quillaud P., Petit-Cuevilly; 305. Cazuguel A., Rennes; 306. Maurin M., Segala; 307. Amable R., St. Savine; 308. Leroy S., Saint-Gildas; 309. Dufflot K., Lille; 310. Damarin R., Villeurbanne; 311. Perret J., Villeurbanne; 312/13/14. Dessoit M. k R. k M., Paris; 315. Morales S., Zaragoza; 316. Hortelano J., 317. Roman L. 318. Noudal J. 319. Couteres G. 320. Garcia O. 321. Kandida H. 322. Wensa A. 323. Gamez C.; 324. Garcia R.; 325. N.N., Meksiko; 326/27/28/29. Burnelle T. k H., Herstal; 330/31. Dujardin H. k E., Herstal; 332. De Weerd S., Kapellen; 333. Sulsky J., Harrengen; 334. Pamphilon G., London; 335. Flower I., London; 336/37. Welsh L. k N., Coventry; 338/39. Brierley W. k E., Lancashire; 340. Smith W., Lancashire; 341. Lindström K., Spanga; 342/43. Planman V. k G., Arvika; 344. Gustavsson J., Amal; 345/46/47. Schlagerstrom G., Enskede; 348. Andersson S., Trollhättan; 349. Karlsson M., Södertälje; 350. Bergström L., Södertälje; 351. Evarsson N., Södertälje; 352. Samuelsson O., Fagersta; 353. Göransson E., Limhamn; 354. Hansson E., Limhamn; 355/56. Holmkvist S. k E., Malmö; 357. Jonsson R., 353. Larsson S., Lindkvist H., Limhamn; 360/61. Lindros E. k M., Limhamn; 362. Lindsjö M., Malmö; 363/64. Nilsson G. k H., Limhamn; 365. Mackenzie M., Malmö; 366. Trulsson T., Limhamn; 367. Kindgren N., Kalmar; 368. Karlsson H., Kisa; 369/70. Nilsson, V. k B., Enskede, 371/5 Widen J., E., H., A. k L., Lidköping, 376/7. Johanson A. k E., Lidköping; 378. Bilfeld S. A., Eksund; 379. Tiele J., Rotterdam; 380/1. Vollegraaf A. k N., IJsselmonde; 382. Verwaard M., Rotterdam; 383. v.d. Wilt J., Rotterdam; 384/5. Veen J. k G., Haarlem; 386. de Vletter E., Rotterdam; 387. Weissberg

A., Amsterdam; 388 Cleij P., Groningen; 389. Schouten A., Gouda; 390. van Veen, H., den Haag; 391. ter Braak A., Zwolle; 392 van Duffelen T., Zwolle; 393. Jansen Fr. P., Zaandijk; 394. Hartsuyker A. C., Zaandijk; 395 Zachte E., Amsterdam; 396. Tekamp T., Amsterdam; 397. Beket S. J., Amsterdam W.; 398. Polman F. A., Zwolle; 399. Gink-Daxböck M. V., Schiedam; 400/1 Bohlander F. k W., Amsterdam; 402. Potters A., Rotterdam; 403. Mansfelder A., Voorburg; 404/5 van Putten R. k K., Amsterdam; 406. Both P., Rotterdam W.; 407. du Bois A., Hoek; 408. Wyma B., Winschoten; 409/10 van der Wal G. k A., Hago; 411. B. A., Hago; 412. van de Nesse P. A., Amsterdam W.; 413. v.d. Plas R., Leidschendam; 414/5 A. k G. W., Hilversum; 416/7 Slikker J. k A., Alkmaar; 418/9 Janssen J. k A., Alkmaar; 420/1 ten Hagen f. k J., Amsterdam W.; 422. de Lange W., Amsterdam; 423/4. Klijn T. C. k W., Amsterdam; 425. Verwer C., Deventer; 426. Bystenbosch E. Deventer; 427. Kraayenzon A., Deventer; 428. Gemser C., Hago; 429/30 van den Berg L. H. k H., Hago; 431. Groeneveld A., Rotterdam W.; 432. Lakemond A., Ugehelen (Gld); 433. Bueno de Mesquita S., 's-Gravenhage; 434. Maasdam H., Zwolle; 435/6. Tool C. G. k M., Leeuwarden; 437. Zandijk E., den Haag; 438. de Smit A., Gouda; 439. de Greef G. C., Utrecht; 440/1 van Rheenen L. k J., Utrecht; 442. Krombeen D., Zuilen; 443/4. van der Meijden F. k T., Utrecht; 445. Burgman G. J., Amsterdam; 446/7. Kjer W. k A., Aarbvhøj; 448. Jakobsen M., Arhus; 449. Nielsen R., Arhus; 450/1. Jensen C. k M., Arhus; 452. Johansen I., Arhus; 453/4. Jensen O. k R., Arhus. 455/6 Hansen V. k O. A., Arhus; 457/8. Christiansen G. k G., Odense; 459. Andersen A., Kopenhago; 460/1. Bryfeld A. k K., Kopenhago; 462. Vinterbolle, H., Kopenhago; 463. Nielsen T., Kopenhago; 464. Jensen G., Kopenhago; 465. Block I., Solingen; 466. Burger J., Klarenthal; 467. Knötzsch H. W., Hagen i. W.; 468. Schneider F., Niedermarsberg; 469. Verot F., St. Etienne; 470/1. Caille M. k E., Chazelles sur E.; 472/8. Caubel, Orleans; 479. Haustrate A., Paris IX; 480. Berlin S., Paris; 481/3 Louis J. k P., Nancy; 484. Mark S., New York; 485. Crispin J., Nottingham; 486. Sykes I., Halifax; 487. Scott R., Wilburg Crest; 488. Geitz W., Hengelo; 489. Veen D., Amsterdam; 490. Naaykens H., Overschie; 491/2 Mes A. P. k M. A., Rotterdam; 493/4. Quispel W. k H. M. Rotterdam W.; 495/6. Heynis-Jouse G. k L. Amsterdam W.; 497/8. Geistdorfer E. k F., Amsterdam; 499. Kater E. C., Rotterdam; 500/1. Moerman A. C. k H., Rotterdam.

Belgio 11, Britio 23, Danio 21, Francio 79, Germanio 173, Hispanio 1, Italio 1, Jugoslavio 2, Kalifornio 1, Meksikio 10, Nederlando 117, Norvegio 1, Svedio 60, Usono 1. Sindikatanoj 256, Nesindikatanoj 122 (inter ili prefero edzinojn k infanojn); la aliaj ne respondis la demandojn.

★

## Kiu veturos al Düsseldorf?

Por akiri altan rabaton de la trajnad-ministracio, ni intencas kolekti la gekamaradojn de la Stuttgart'a ĉirkaŭo k organizi komunan vojaĝon. Por scii, kun kiom da veturontoj ni devas kalkuli, ni petas informojn de gek-doĵ, loĝantaj en proksimaj lokoj, kiuj — veturonte al Düsseldorf — devas pasi Stuttgart'on. Anoncu vin je k-do Tielsch, Stuttgart-W, Schwabstr. 22.

(Rekomendinde al aliaj urboj!)

★

## Kongreskartoj

Por la kongreso OKK eldonas kongreskartojn por membroj (vuĝaj) k gastoj (verdaj) kun numeroj korespondaj al „Listo de Kongresantoj”.

La provizora kongreskarto estas redonota post alveno en Düsseldorf ĉe akceptejo, kie vi ricevos la definitivan.

# La Voĉo de Kongreso

Eldono okaze de la 25a kongreso de Sennacieca Asocio Tutmonda - Duseldorfo 2a - 8a de aŭgusto 1952

## SALUTON!

Karaj gekamaradoj!

La preparaj laboroj estas finitaj — nia jubilea kongreso komenciĝas. Ni, la OKK-anoj k la Düsseldorfaj SAT-anoj, ĝojas pri via alveno k salutas vin elkore.

Kiam en Stokholmo vi akceptis nian inviton, ni rigardis vian akcepton bonan antaŭsignon por la movado mem, multe pli ankoraŭ pro la firmigo de l' amikeca rubando kiu ligas nin, Esperantistoj.

Ni scias k spertis, ke la naciecaj malamikajoj ne tuŝis la kvazaŭn familian vivon; ni bone memoras pri la artikoloj en „Sennaciulo“, en kiuj ni legis: „Ne ekzistas komuna kulpo“ — „Ne ĉiuj germanoj estas

tonto. Ni ĉiuj klopodu ke la familia k amikeca sinteno, kiu nun regas inter ni, restu por ĉiam tiam ni certe sukcesos venki ĉiujn malfacilaĵojn, kiuj nun ankoraŭ malhelpas nin.

Ni klopodis ĉion aranĝi laŭeble bone. Se tamen kelkiu opinias havi kaŭzon por plendi, li ne forgesu ke ofte neantaŭviditaj malfacilaĵoj kaŭzas ŝanĝon de la preparoj, eĉ de la programo; ne malgrandajn zorgojn al ni faris la lasttempaj anoncintoj k tiuj, kiuj post la finigo de la mendoj ĉe la trafikumista notis aliajn aranĝojn. Nun — ni esperas ke ankaŭ ili povas esti kontentaj; se ne — ili plendu ĉe la respondecaj OKK-anoj ke ne ĉe aliaj kongresanoj. Ĉiuj deziras travivi agrablajn k rememorindajn tagojn; ni ĉiuj zorgu ke efektiviĝu niaj deziroj. En tiu ĉi senco Koran bonvenon k ĉion bonan!

mielo, kolbasetstandoj, biertendoj kaj kun ĉiuj mirakloj kiuj kaptas tiel la junulojn kiel ankaŭ la maljunulojn.

Kaj je la lo-a de novembro estas festata la plej bela el inter la infanfestoj, la festo de St. Martin. Nenie ĝi disvolviĝas tiel pompe kiel ĉi tie en Düsseldorf. Fakte centmiloj da lampionportantaj maljunaj kaj junaj infanoj estas survoje je ĉi tiu Martinvespero inter la sekvantaro de St. Martin sur blanka ĉevalo rajdanta, kaj de la almozetulo kun kiu li partigas sian mantelon. Dekduoj da blovorkestroj ekludas la malnovajn Martinmelodiojn tiel sentoplene kaj malrapide, ke la rapidemaj infanoĉoj ĉiam antaŭas. Kaj dum en la gastejoj aŭ hejme la Martina ansero estas preparata, oni aŭdas ankoraŭ longe la infanojn per saketoj ekipitaj en la stratoj kaj per iliaj helaj voĉoj kanti la kanton de la riĉa viro „kiu al ni multe povas doni“ kaj kiu „feliĉege vivu kaj mortu“. — Kaj jen ankoraŭ foje „Jan Wellem“ la progresema kaj artama elektoprince, unu el la germanaj „roi soleil“. Li lasis al la Düsseldorfanoj la pentrajgalerion kun proksimume 40 eila plej famaj pentraĵoj de Rubens, 8 pentraĵojn de Rembrandt, 17 verkojn de van Dyck k.a., poste transigitaj al Munkeno (München). La kolektaĵo estis la kaŭzo de fondo de akademio pri belaj artoj. Dum kristnaska tempo la artistoj de Düsseldorf ofertas en iluminataj montrokestoj siajn verkojn, sub la devizo. „Artistoj helpas solvi vian donacproblemon“. Estas eksperimento, memhelpo. Ĝi sugestas al la preterirantoj pripensi, ke Düsseldorf estas arturbo kun unu el la malmultaj akademioj de Belaj Artoj. — La Königsallee (Reĝa aleo) estas la mezurilo por ĉiuj aferoj de la Düsseldorfanoj, ilia plej bona elmontraĵo, ilia bona ĉambro. Migranto, vizitante Düsseldorfon, ĝuu ĝian bonan proporcion, ĝuu la elegantecon kaj ĉarmon de ĝiaj promenantinoj. Somere restadu sur la kafoteracoj, kiuj al vi samkiel ripozaj insuloj donos okazon reve, sendanĝere flirti aŭ pli malpli profund- aŭ facilnime konversacii. Lasu vin kapti de la dekoraciarto de la pormododomoj. Ne preterlasu viziti la „Venus inter la stratoj“ dum la kastanflorado; la „kandeloj“ nenie estas tiel dekorativaj kiel ĉi tie. Ĝuu ĝian ĉarmon ĉiuhore dumtage kaj dumnokte, indiferente je kia sezono, ĝi ĉiam ion prezentos al vi.

25 KONGRESO 25

2.-8. AUGUSTO

ESPERANTO

SAT ★ 1952 ★



kulpaj“ ktp. Vi defendis nin, kredis pri nia senkulpo.

Ĉu ni asertu, ke multaj Esperantistoj en Germanio estis persekutataj de la hitlerismaj institucioj, ke multaj estis enkarcerigitaj eĉ mortis en koncentrejoj k malliberejoj?

Ni ne plu parolu pri jena malfeliĉa tempo kiu preskaŭ sukcesis fendi ankaŭ nin en malamikaj kampoj. Ni ĝoju ke ni sukcesis resti tiaj, kiaj ni estis antaŭ la milito — amikaj k konfidemaj gekdoj, samcelanoj, Esperantistoj, sennaciecaj amikoj.

La fakton, ke estas Jubilea Kongreso kiu kunigas nin en komuna laboro, ĝojo k mi grado, ni prenu bonan signon por la es-

Pri

### Düsseldorfaj Festoj:

Per Karnavalo komenciĝas. „Hoppediz“, la reprezentanto de spriteco düsseldorfa, de la saĝa arlekeneco, ekvokiĝis jam la 11-11. je la 20-11 horo. Sed je la 11-1. la spriteco de „Hoppediz“ estas okupinta ĉiujn korojn gearlekenajn. Unu arlekenkunsido sekvas la alian. La ondoj de la amuzo atingas la kulminacion je „Roziundo“, je la lesta okazo videble kaj tute permesate esti en granda demonstracio arlekeno inter gearlekenoj. Je la „Cindra Merkredo“ estas mangataj rulitaj haringoj kaj haringoj marinigitaj, la arlekeneco cedas al la racio, kostumoj kaj insignoj arlekenaj estas zorgeme forpakataj en kesto kun preparaĵo kontraŭ tineoj. (Tineajbuloj). Kaj nun oni preparas baldaŭ la „Schützenfest“ (pafista-festo). En ĉiuj societoj de la honesta pafista frataro de la St. Sebastianoj de 1435 dum julio kaj aŭgusto estas pafota pro la digneco de la pafista rego. En la gastejoj tiam regas gajeco senbrida kaj sur la Rejnherbejoj okazas dum tuta semajno popolfesto, kiu evoluiĝas al rendevuo por ĉiuj Düsseldorfanoj kaj por gastoj el proksimo kaj malproksimo. Per ĝi estas ligata kermeso kun domaltaj „Achterbahnen“ (konstruaĵo en formo de oko), karuseloj, aerbalonoj, indianaĵoj prezentadoj, mallongrevuoj, turka

# ESPERANTO

## KAJ LERNEJO



(daŭrigo) el n-ro 11a)

Kaŭze de la sentvaloro kaj de la interna ideo — tio estas „frateco k justeco inter la homoj” — E. estas egalvalora je ĉiu lingvo. Ĝi enhavas propran moralon: la etikon de la humaneca mondfrateco, internacian solidarecon k reciprokajn helpon. Tial la subtenado de E. signifas kunhelpon, por ke estiĝu pliaj pontoj de koro al koro, de popolo al popolo, de kontinento al kontinento ĝis kiam ĉiuj nacioj havos la saman spiriton kiu estas necesega, por ke la homaro ĝuu la epokon de la libereco, sekureco k paco. Tiu alta celo kompreneble bezonas k postulas multe da tempo, multe da pacieneco k multe da bona volo.

E. disvastigas la spiritan horizonton de ĉiu homo en granda grado. Tian li ricevos — sekve de precizaj informoj el rektaj fontoj sen cenzuroj — ĉiufankajn, ampleksajn k verajn raportojn el ĉiuj landoj de la mondo. Ĉiu homo havas iel pli malpli malkonfidon, retenemajn pensadon k sentadon, se li kontaktas kun alilingvano. Tiu malkonfido malaperas tute aŭ grandparte, se la anoj de diversaj lingvoj interparolas e-lingve. E. do peras novan, humanan harmonion k koran konsenton. El tio rezultas, ke E. forigas malbonajn pensojn k speciale la diversajn antaŭjuĝojn inter fremdaj personoj.

La mondfederacista kongreso en Romo unuanime rekomendis la instruadon de E. en la elementaj lernejoj de la tuta mondo kiel edukilo al mondĉivitaneco.

Resume: E. estas vere popola klerigilo k speciale por la junularo grava edukilo.

### ESPERANTO KIEL PACIGA FAKTORO

Esperanto k paco estas gefratoj!

E estas multe pli ol oportuna k moderna interkompreniĝilo. Ĝi estas precipe ankaŭ grava mondpacigilo se oni konsideras jenajn detalojn: La danĝerplena estanteco — kiu enhavas multe da nesolvitaj problemoj ĉiuspecaj k ĝermojn por novaj konfliktoj — estas granda minaco por la tuta homaro, se la popoloj ne baldaŭ interkompreniĝas.

Franca proverbo diras: Interkompreniĝi — tio estas la paco.

La paciga E volas alporti helpon, ĉar ĝi estas ankaŭ unu el la fundamentaj kondiĉoj por la interkompreniĝo inter la popoloj. Tion asertis inter aliaj ankaŭ grafo Tolstoj, Berta v. Suttner, Maxim Gorki, Henri Barbusse, Albert Einstein, Romain Rolland.

La lerneja rektoro angla, Mr. Rayner skribis: Mi opinias ke E kunigas la popolojn, forigas miskomprenojn, ebligas la liberan interŝanĝon de ideoj. Tiamaniere E. kunhelpas forigi la militojn. Ĉu vi volas studi la efikon de komuna lingvo? Tiu lingvo estas la longe sopirita penso de multaj homoj kiu estas idealistoj k samtempe ankaŭ realistoj.

E volas forigi la disigajn, bedaŭrinde ankoraŭ altegajn k malmalmodernajn lingvobarojn, kiuj en la nuna, daŭre k konstante kreskanta mondtrafiko estas granda sensensaĵo por ĉiuj progresemuloj; ĝi volas alproksimigi la naciojn kulture k sociale. La pontlingvo volas fariĝi la daŭra fundamento por la animeca alproksimiĝo de la popoloj — la porpaca kunvivado k kunlaborado de la nacioj sekvas.

La interpopola paco urĝe bezonas mondhelpingvon — la facile lernebla E plenumas tiun celon. Ankaŭ la universitata profesoro d-ro Köhler, Berlin, asertas: „E estas absolute taŭga mondhelpingvo por ĉiuj popoloj. Ĝi estas triumfo de la homa spirito. E estas ĉie disvastigita k vivanta lingvo.”

La principoj de la UN (Unuiĝintaj nacioj) estas precize la samaj kiel tiuj de la E-istoj, ĉar jam la aŭtoro de E mem pravis per la kreo de tiu pontlingvo en la jaro 1887 la necesajn, humanecajn k mondĉivitanecajn idealojn. Tiu porpaca pioniro laboris k agis idealiste, ĉar li oferis sian tutan monon, sian havaĵon k sian vivagadon por la ideoj de interpopola kompreniĝo.

La principoj de UN tekstas: „La generacioj estu protektataj kontraŭ militoj. Ili estu toleremaj k kunvivu kiel bonaj najbaroj en paco, ili flegu amikecajn rilatojn, same ili kunlaboru por sociala, kultura k humaneca aferoj sen diferenco pri raso, lingvo k religio.”

Por ke ne estiĝu eblaj eraroj! E — kiel lingvo — ne alportas la pacon, ĉar la historio pruvas la fakton, ke la komuneco de lingvoj ne protektas kontraŭ familioj. Ankaŭ la diverseco de lingvoj ne ĉiam estas malfeliĉo. Tion pruvas ekz. la Svisio, en kiu la anoj de diversaj lingvoj vivas en paco. Malgraŭ tio E estas k restas kaŭze de sia morala valoro k kaŭze de sia kora influo grava ĉefbriko por la estonta mondpaco.

Jena afero estas nerefutebla fakto: ĉio, kio alproksimigas la popolojn, estas porpaca laboro k porpaca perilo. Tial ĉiu homo, kiu parolas aŭ skribas al homo de alia lingvo aŭ negoce aŭ societe aŭ science, estas helpanto en la batalo kontraŭ la internacia malamikeco. Tio validas tiom pli por E, ĉar tiu pontlingvo kiel popola klerigilo k kulturigilo kunigas la korojn de ĉiuj nacioj. Tiamaniere E esence plibonigas nian politikan mondatmosferon.

Ĉar la internacia paco estas la plej grava problemo de nia danĝera mondsituacio, E ankaŭ volas kunhelpi per forigo de la kaŭ-

zoj pri internaciaj miskomprenoj, se ili kuŝas en la diverseco de la lingvoj.

Speciale la lastaj jaroj klare pravis, ke ankaŭ la babilona lingvo-konfuzigo havis grandan kulpon filate al mondmilito, ĉar la popoloj, kiuj ne povas interkompreniĝi, estas taŭgaj objektoj por militoj. Tial la pontlingvo E en la nuna tempo de la ega malkonfido internacia estas duobla neceso.

### LERNIGU AL NIAJ INFANOJ ESPERANTON! (Kardinalo d-ro Piffi)

Per la komuna lingvo la fratiĝo de la homoj progresos!

La junularo devas lerni lingvojn, ĉar tion postulas la nuna babilona lingvo-konfuziĝo k speciale la hodiaŭa kulturo. Sed kiun lingvon krom la gepatra la infano lernu kiel unua? Ankaŭ ĉitie oni devas atenti la gradon de la lerneblo de lingvoj, plie la perceptkapablon k la sanstaton de la infanoj. Plie oni devas ankoraŭ atenti unu el la plej gravaj pedagogiaj principoj: „De facilo al malfacilo!” Nur E perfekte plenumas ĉiujn kondiĉojn tiurilatajn.

La enkonduko de E en ĉiujn lernejojn estas la plej bona vojo por ke ĝi disvastigu laŭsisteme k sukcesplene.

Tiu-ĉi deziro estas absolute rajtigata, ĉar E estas taŭga interkomprenilo por ĉiuj popoloj, grava edukilo, bonega klerigilo, bastiono kontraŭ la familioj.

Pliaj avantaĝoj de la pontlingvo E:

E estas absolute neŭtrala — ne apartenas al iu politika partio, religio aŭ nacio, ĝi do ne malutilas aŭ ofendas iun, ĝi privilegias k favoras nenium.

La interpopola lingvo E havas grandan valoron, ĉar ĝi subtenas la komunecon de ĉiuj popoloj malgraŭ iliaj multaj naciaj, socialaj, politikaj k geografiaj baroj. Ĝi estas unu el la plej grandaj sukcesoj de la homaro de post la invento de la presarto. Ni nuntempe ne jam povas superrigardi la konsekvencojn k plibonigaĵojn kiujn E alportos post ĝia enkonduko sur ĉiuj terenoj de la homa kunvivado. Buŝa k skriba interkompreno k reciproka interkompreniĝo de ĉiuj nacioj rezultos veran mondkulturon. Tiu-ĉi lingva trafikilo kreas la spiriton kiun bezonas la hodiaŭa turmentata, suferanta k senkonsola mondo por atingi finfine per pacaj rimedoj la plej altan ŝtupon de sociala, kultura k politika kunvivado. E estas tre taŭga bazo por la instruado de aliaj fremdaj lingvoj. E ne abolas nian gepatran lingvon. Ĝi nur volas esti la dua lingvo por ĉiuj nacioj de la mondo, ĉar ĝia agadkampo kuŝas inter la popoloj. Tial la universala lingvo ne ofendas la nacian senton de popolo. E k la gepatra lingvo ne kontrastas, ne estas maloj, ne estas kontraŭecoj, male — ili kompletigas sin reciproke.

Plie infano almenaŭ povas lerni la facilan E-lingvon se ĝi ne kapablas finlerni diversajn aliajn, malfacilajn lingvojn, kio bedaŭrinde ofte okazas.

Ĉiu infano ĉiukaze lernu minimume du lingvojn, unue la gepatran ĝisfunde por la pensinterŝanĝo interne de la propra popolo k due la mondpopollingvon E por la inter-

Adresoj de OKK-anoj:

Hans Pillekamp

Hamburgerstr. 5-21, Düsseldorf

Wilhelm Ackermann

Hammerstr. 58, Düsseldorf

Werner v. Beesten

Kolpingstr. 4

Düsseldorf-Benrath

parolado kun anoj de fremdaj lingvoj se la apliko de la gepatra lingvo ne estas ebla.

Esperanto en la lernejo estas — vidite en la lumo de la racia zorgo por nia infano — simpligo k vivigo de la lerneja instruado k samtempe la enmembrigo de la junularo en la mondtrafikon.

Sed kiamaniere ni povas enkonduki la kulturprogreson E en la lernejojn? Pripensu ke neniu kapablas fari ion, kio kontentigas ĉiujn. Ĉiam k ĉie estos malmulte instruitaj personoj, fikritikuloj, grumbluloj, kontraŭuloj k kulturbremuloj. Bedaŭrinde sur nia planedo ankoraŭ vivas homoj, kiuj daŭre persistas je sia amata frazo „kial ni faru ĉion simple, se ni povas fari ĉion komplike?“. Ne timu tiujn mallongpensulojn, ĉar nur la bonfarto de nia junularo estu nia plej alta celo! Ĉiuj al E eblaj kontraŭsentoj k kontraŭargumentoj povas esti senfortigataj. Cetere la ekonomia leĝo — kontentigo de homaj bezonoj per plejeble malmulta laboro — ankaŭ batalas por la mondlingvo E.

En nia federacia respubliko Germanio oni instruas E en kelkaj lernejoj — espereble baldaŭ sekvos multaj aliaj, multaj popolaltilernejoj akceptis E en la instruplanoj. Multaj unuigoj k kluboj en- k eksterlandaj favoras k flegas E k klopodas plivastigi ĝian bazon.

### La prospekto pri Düsseldorf

Jam en la marta n-ro de „Sennaciulo“ ni anoncis aperon de ilustrita prospekto pri la kongresurbo. Pro teknikaj kaŭzoj, pri kiuj ni ne kulpis, la apero estis prokrastata. Pasis ankoraŭ semajnoj, ĉe monatoj, ĝis kiam ni ricevis la manuskripton por la E-lingva eldono.

Ni preskaŭ jam timis, ke ĝi aperos — nur post la kongreso. Despli granda nia ĝojo, ke ni povas ĝin aldoni al la kongresajoj. Vi mem juĝu, ĉu ĝi kontentigas viajn dezirojn. Almenaŭ ĝiaj amplekso k ankaŭ enhavo povas esti modelo por multaj aliaj urboj. Ni konfesas, ke ĝi ne estas tiel riĉenhava kiel la broŝuro kiun eldonis Japanio en la 20aj jaroj „Japanujo, lando de la leviganta suno“. Tiam estis ankoraŭ alia tempo — k urbo ne estas lando. Ni ĝoju, ke la urba varb- k trafikoficejo klopodis k sukcesis eldoni fian prospekton, kiun vi konservu kiel memoraĵo pri la Jubilea Kongreso de SAT.

Prof. G. Waringhien

### LETEROJ DE L. L. ZAMENHOF

Verko en du volumoj po 386 paĝoj  
Tote bindita, kun orumita titolo  
Prezo: 2,25 dol. po volumo.


Ĉiuj leteroj, komentitaj k ordigitaj en ĉi tiu verko, koncernas la periodon de 1900-1914; ili klare lumigas, el ĉiuj flankoj, tiun ĉi interesan komencperiodon k iliajn karakterojn; ili montras la malfacilan lukton de la aŭtoro de esperanto por certigi la fundamenton al plua evolu de sia kreaĵo.

# 25 KONGRESO 25

2.-8. AUGUSTO

ESPERANTO

SAT ★ 1952 ★



## Programo de la Kongreso

**Sabate, 2.8.**

9,00 h. Malfermo de la akceptejoj (Rejnhalo)  
Malfermo de la kongresa poŝtoficejo.  
20,00 h. Interkonatiĝa vespero (fino?)

**Dimanĉe, 3.8.**

9,00 h. Malfermo de la akceptejoj.  
Malfermo de la kongresa poŝtoficejo.  
10,00 h. Solena malfermo

- a) Himno: Mondopaco (E-lingva ĥoro)  
Popopĥoro Düsseldorf-oriento
- b) Salutparoloj
- c) Elektigo de kongresaj instancoj
- ĉ) Komuna kanto: Fratoj al Sun!

12,30 h. Fotado.

13,00-14,00 h. Komuna tagmanĝo.

14,00 h. Fakkunsido de la naturamikoj.

14,30 h. Ekskurso.

16,30 h. Frakeikunsido trockista.  
Fakkunsido ĝenestruiŝta.

19,00 h. Vespermanĝo.

20,30 h. Prelego de K-do Waringhien: „Kion nekredanto povas trovi en la Biblio“.

**Lunde, 4.8.**

9,00 h. Malfermo de la akceptejoj.  
Malfermo de la kongresa poŝtoficejo.

10,00 h. Unua laborkunsido.

12,30 h. Komuna tagmanĝo.

14,30 h. Prelego de K-do Laurat: „De libera al organizita kapitalismo“ (Ŝuman-plano).

18,00 h. Frackikunsido sennaciista.  
Fakkunsido IGEL.

19,00 h. Vespermanĝo.

20,30 h. Prelego de K-do Wettig.

**Marde, 5.8.**

9,00 h. Malfermo de la akceptejoj.  
Malfermo de la kongresa poŝtoficejo.

10,00 h. Dua laborkunsido.

12,00 h. Komuna tagmanĝo.

13,30 h. Vizitoj al fabrikoj.

- a) sapfabriko.
- b) konsumkooparativo.

c) viandajfabriko.

ĉ) presejo.

aŭ ekskurso (por la ceteraj)

17,30 h. Fakaj, Frackiaj kunsidoj.

20,30 h. Debato, kiun enkondukos K-do G. Dejardin, pri la temo: „Kiel reagi kontraŭ la militfaktoroj?“

**Merkrede, 6.8.**

9,00 h. Malfermo de la akceptejoj.  
Malfermo de la kongresa poŝtoficejo.

10,00 h. Prelego de K-do Bartelmes: „Henriko Heine, sennacieca poeto“.

12,00 h. Komuna tagmanĝo.

13,30 h. Frackikunsido anarkista.

14,30 h. Fakkunsido pacista.

17,00 h. Prelego de K-do Jacobsen: „Evoluo k taskoj de la Dana Kleriga Asocio“.

20,00 h. Multkolora Vespero.

**Ĵaŭde, 7.8.**

8,00 h. Ekveturo de la ŝiphaltejo al tuttaga ekskurso.

**Vendrede, 8.8.**

9,00 h. Malfermo de la akceptejoj.  
Malfermo de la kongresa poŝtoficejo.

10,00 h. Prelego de K-do Mark Starr, N. Jorko: „Komparo de laboristmovadoj en Usono k Eŭropo“.

12,30 h. Komuna tagmanĝo.

14,30 h. Adiaŭa kunveno.

## Kara gasto!

Vi, kara kamarado, kiu venis al Düsseldorfo por ĉeesti nian jubilean kongreson, kvankam vi ankoraŭ ne aliĝis al nia movado — vi estas kore bonvena!

En ĉi tiu kongreso vi havas la okazon ekoni la spiriton de nia asocio, vi dum kelkaj tagoj povas vivi inter kamaradoj, en sennacieca sfero.

Cu plaĉis al vi la restado inter gekamaradoj el plej diversaj landoj?

Ni, niavice ĝojas, ke ni trovis vin en nia mezo, sed ... ni atendas de vi, ke vi kun ni metu la ŝultrojn sub la laboron farendan, ke vi enviciĝu, ke vi fariĝu SAT-ano!

Sendube vi penos ĉeesti ankaŭ nian sekvontan kongreson; ĉu ni povos bonvenigi vin tiam kiel SAT-anon?

Anoncu vin dum la kongreso ĉe OKK aŭ ĉe via landa peranto!

C.v.E.

ĈIU SAT-ANO NEPRE POSEDU  
LA SAT-ELDONON:

### LA MONDO NE HAVAS ATENDEJON

Teatraĵo de Maurits Dekker tradukita de K-do F. Faulhaber  
80 pĝ. Form. 13 1/2 x 20 cm.  
Prezo: 0,70 dol. Kun ok scenfotaj.

La brule aktuala temo de  
l' atomforto.

# „NATURAMIKOJ“

## kaj Esperanto

La membroj de la internacia Turista Asocio „La Naturamikoj“ (TAN) troviĝas fakte en ĉiuj terglob-anguloj. Tial ne estas hazardo, ke inter la TAN-anaro estiĝis la deziro, havigi al si taŭgan interkompreniĝilon. Kaj ĉar ili konvinkiĝis per la agado de l' laboristaj geesperantistoj, ke TAN-anoj ankaŭ alprenis ĉi-lingvon.

Estis unika la ideo, unuigi tiujn gelaboristojn, kiuj ne nur volas esti la sklavoj en la homa socio, sed kiuj deziras leviĝi el la ĝenerala marĉo por kleriĝi laŭ iliaj apartaj ecoj k' kapabloj, kaj kiuj volas interkonatiĝi kun la sorto de l' gekamaradoj el aliaj landoj.

La rolo de TAN estas grandega k' grava, se oni konsideras la vekigon de l' intereso por la mirindaĵoj en la naturo inter la laborantaj tavoloj, la aranĝadon ke samsortanoj migru kune, flegu la kamaradecon aŭ solidaron, ebligu la interkonatiĝon de l' homoj, la interŝanĝon de spertoj k' travivaĵoj, la instalon de ferio-restadejoj ktp.

Kiom politikaj partioj k' sindikatoj plenumas la politikajn k' ekonomiajn taskojn pri la efektivigo de l' laboristaj interesoj, la TAN-movado ebenigas la vojojn por la gelaboristoj sur la kultura tereno. Ĝi zorgas ekz. por taŭgaj, malmultekostaj liber-temp-aranĝoj, konstruas aŭ instalas memstare ferio-restadejojn k' migradkabanjojn. Aparte gravaj estas la regulaj socialaj migradoj, kiuj ne limiĝas al la ĝuado de belaj pejzaĝoj, al la konstato de abundo da kreskajoj, al la admiro de l' sennombraj koloroj k' specoj inter la floraro, al la aŭskulto de l' vigla birdaro, al la ununura sportludado, al naĝado, skiveturado, grimpadado, popoldancado ktp., sed kolektigas la fortojn por la ĉiutageco, okupas nin per la studado de l' geografiaj, geologiaj, biologiaj, zoologiaj, historiaj k' aliaj scifakoj, antaŭ ĉio por la ekono k' pritraktado de l' socialaj problemoj. La interkonatiĝo kun la vivo de l' samsortanoj en aliaj landoj plivastigas plie la spiritan horizonton. TAN instruas nin, ke la sorto de l' laboristaro kaj la liberigo el la sklava sistemo de l' kapitalismo estas internacia, eĉ mondampleksa problemo. La TAN-movado konsistas el organe kreskinta mondorganizo, kiu nuntempe disponas pri lokgrupoj k' izolaj gemembroj en ĉiuj terglobaj regionoj.

Leviĝis la TAN-ideoj trans maroj k' montoj per la interligo de homo al homo iutegale, al kiu ajn raso, nacio aŭ haŭtkoloro li apartenas. Kaj Esperanto servas bonege, kion pruvas la depost kelkaj jaroj funkcia Esperanto-Fako en TAN (TANEF), kiu eĉ sukcesis eldoni bele ilustritan organon „La Migranto“ k' kiu povis jam aranĝi kelkajn internaciajn renkontiĝojn. Ekde la 19.VI. — 30.VIII. 52 okazos granda „Naturamika — Camping“.

La tendaro moderna stariĝos en la trilanda-angulo (Svisio-Francio-Germanio)

SAT-anoj kutimiĝu al eksternacia sent-, pens- k' agadkapablo...!!

# Listo de aligintoj

(daŭrigo de la listo en nr. 10 de „Voco de l' kongreso“)

502/4 van der Starre, A., A. C. k M. C., IJmuiden; 505. Burgmann, Amsterdam; 506. Henzen, D., Deventer; 507. Kwantes, A. H. C. M. k C., Maarlem; 509. van Beek, A., Opheusden; 510. Rooke, J., Winterswijk; 511. van den Berg, M., Rotterdam; 512/3. Hazeleger, H. k L., Amersfoort; 514. Kuiterman, J., Emmen; 515. Krause-Kok, C. N. J. Zuilen-Utrecht; 516. van Batenburg, J. C., Schiedam; 517. Smit, W., Rotterdam; 518/9. Wals, E. C. k C. Cl., IJmuiden; 520. Brendt, E., M.-Gladbach; 521. ten Hagen, A., Amsterdam; 522. Schmalt, K., Weinheim; 523. Nilson, A., Enschede; 524/6. Gahlin, M. S. k T., Johanneshov; 527/8. Sandin, G. k U. B., Jojanneshov; 529. Eneroth, E., Malmö; Lindblom, K., Lidköping; 531. Britten, D., Northampton; 532. Goodrich, A., Northampton; 533. Mearns, J., London E. 6. 534. Plowman, G., White Hills; 535. Dubol, A., Paris; 536. Lagant, K., Paris; 537. Schmidt, E., Remscheid; 538/9. de Bruin, G. P. k K. L., Enschede; 540. Kootstra, A., Enschede; 541. Pieperiet, G. J. H., Enschede; 542. Veen-Wilkers, M., Amsterdam-W.; 543. Butter, H. C., Zaandam; 544. Ran, J. C., Rotterdam; 545. Kootstra, W., Enschede; 546. Vugteveen, G., Enschede; 547. Breevaart, J., Poortugaal; 548. Poldervaart, L., Nieuw-Helvoet; 549. de Vries, A., Amsterdam; 550. Nijman, D., Amsterdam; 551/2. Beijne, H. k M., Amsterdam; 553. Timmer, H., Deventer; 554. Jensen, E., Aarhus; 555. Puff, E., Frankfurt; 556. ten Hagen, I., Amsterdam; 557/8. Christiansen, G. k G., Odense; 559. L., Tours; 560. Schmid, J., Neu-Isenburg; 561. Reuchlin, R., Tuttlingen; 562. Lundgren, A., Kvarnsveden; 563. Svensson, H., Höganäs; 564. Eneroth, E., Malmö; 565. Marble, R. C., van Nuys, Calif.; 566. Wolf, T., Amsterdam; 567. Costa, L. J., Santos; 568. Weiler, A., Karlsruhe-Durl.; 569. Schmitt, Ph., Kaiserslautern; 570. Sternjacob, M., Nancy; 571. Ego, A., Caudry; 572/3. Delsol, C. k e., Paris 2e; 574. Bessac, G., Angers (M. & L.); 575. Leplat, G., Roubaix; 576. Lemme, Liges; 577. Bosland, J., Villeurbanne; 578/9. Pialla, A. k P.m Nyons (Drome); 580. Goblot, L., Lyon; 581. Carrou, P., St. Denis; 582. Prevost, R., Paris; 583. Koene, J.L., Amsterdam; 584. Künner, J. Gladbeck; 585. Ophees, H., Hüls Krefeld; 586. Bechthold, Ch., Wiesbaden; 587. Nussbaum, L., Köln-Dellbrück; 588. Dequatere, J., Mahabo; 589. Fechner, J., Düsseldorf; 590. Winkler, H., Betzenstein; 591. Goeres, H. D., M.-Gladbach; 592. Wetzig, O., Düsseldorf; 593. Theobald, H., Ham-

★ ★ ★ ★ ★ ★ ★ ★

apud Efringen-Kirchen, regiono Lörrach, kie kolektiĝos kvante la internaciaj TAN-anoj, kiuj i.a. ankaŭ aplikos k' uzos la utilan interkompreniĝilon Esperanto. Dum la SAT-Kongreso en Duseldorfo la TANEF-anoj kunvenos por ordigi organizadajn problemojn k' ĝui gajan kamaradecon inter la diverslandaj TANEF-anoj.

Herman Wagner.

burg; 594. Jung, Theo, Scheveningen; 595. Weber, F. A., Wieda; 596/7. Oudenhooven, F. k H., Amsterdam; 598. Boers, J., Rotterdam; 599. Gruys, S., Koog aan de Zaan; 600. Tienkamp, J. E. Tolbert; 601. Vos, Z., Folbert; 602. Strijker, P. H., Winschoten; 603. van den Akker H. N., Amsterdam-W.; 604. Niestadt, W. H., Gouda; 605/6 Donkers, A. k M. C., Rotterdam-Z; 607/8 van Buitenen, P. k H., Rotterdam-Z; 609. Butselaar jr., Purmerend; 610. Peyraud, Y. R., Sanites; 611. Chargé, P., Sanites; 612. Bues, E., Karlsruhe; 613. Karsson, A., Lidköping; 614. Johansson, E., Malmö; 615/7. Geist, J., S. k B., Enschede; 618. Törnkvist, P., Nynäshamn; 619. Höglund, O., Nynäshamn; 620. Samuelsson, S., Fagersta; 621. Svensson, G., Karlskrona; 622. Kudlinski, W., Düsseldorf; 623. Zygmowski, T., Düsseldorf; 625. de Maulder, H., Boom; 626. Borghijs, R., Willebroek; 627. Boudart, D., Quaregnon; 628. de Brito Lopes, G., Santos; 629. Dr. Nolle, K.O.B., Koblenz; 630. Bettmann, D., Paris 18; 631. Waringhien, G., Paris 18; 632. Roose, M.-L., Brügge; 633. de Pauw, M.-C., Brügge; 634/5. Pialla, A. k P., Nyons; 636. Marty, M., Belfort; 637. Codina, A., Toulouse; 638. Falconnier, J., St. Francois; 639. Aubertin, P., Evreux; 641. Soubieux, J., Paris 10; 642/3 Lubik, S. k N., Narbonne; 644/5 Prodhomme, M. k M., Rennes; 646/7. Sayag, L. k A., Paris 18; 648/9. Chevrolat, G. k G., Paris 13; 650. Tremon, G., Villeurbanne; 651. Delalot, B., Pantin-Seine.

Anoncis sin el Belgio 19, Brazilio 2, Britio 27, Danio 24, Francio 113, Germanio 193, Hispanio 1, Italio 1, Jugoslavio 2, Kalifornio 1, Madagaskaro 1, Meksikio 10, Nederlando 170, Norvegio 1, Svedio 80 kaj Usoro 2.

H. Roland-Holst:

## ROZA LUKSEMBURG

Traduko de E. Wels. Biografio pri socialista batalantino. 236 paĝoj. Prezo: 1.50 dol. Afranko 10%

Ĉe SAT.

## SAT-libroj ne indikitaj en la lasta Katologo:

Iom pri Stokholmo, 40-paĝa broŝuro, bele ilustrita... Prezo: 0.28 dol.

Revolucio en Lingvoscienco, Andreev, Marrteorio. 68 paĝoj. Prezo: 0.15 dol.

Vojoj de formiĝo kaj disvastiĝo de internacia lingvo. Drezen. 64 paĝoj. Prezo 0.15 dol.

Orienta Blovo. 28 paĝoj revu-formataj (krestomatia, kun bildoj.) Prezo: 0.15 dol.

En Katenoj de Maljusteco. Virina Krestomatia. 38 paĝoj. Kun bildoj. Prezo: 0.15 dol.

Plus 10% afranko.

La lastnomitaj broŝuroj estas nur en limigita kvanto liverablaj

SAT - Parizo.